

Dmitrij Mamin-Sibirjak

Fabeloj al Helenjo

Содержание

Mamin-Sibirjak	.0004
Antaufabelo	.0005
Fabelo pri la kuragha leporo Long-orela — Strab- okula — Mallong-vosta	.0006
Fabelo pri kulineto	.0011
Kiel vivis la lasta musho	.0018
Lakteto, avena kacheto kaj griza kato Murko . .	.0034
Estas tempo por dormi	.0041

MAMIN-SIBIRJAK
FABELOJ AL HELENJO
Tradukis N.Kabanov (1909)

Mamin-Sibirjak

Li estis unu el la plej fame konataj rusaj verkistoj kaj naskighis en jaro 1852. Li skribis multajn rakontojn kaj romanojn, en kelkaj el ili estas bonege priskribita la vivo en mineja regiono de Uralaj montoj kun ghiaj rabavidaj serchantoj, kun ghia severa militista regionestraro, ghiaj ekspluatantoj, furioza malshpareco kaj nelongedaura richeco. Chiuuj liaj verkoj spiras vivecan veron kaj altan artecon; krom tio en ili estas multe da ago, malsimpla kaj interesa intrigo kaj malsameco de karakteroj kaj personoj. Alia amata temo de Mamin-Sibirjak estas la mondo de infanoj; li skribas ne nur pri infanoj, sed ankaŭ por infanoj, estante agema kunlaboranto de multaj infanaj jhurnaloj. Liaj fame konataj kaj belegaj rakontoj kaj fabeloj prezentas per sia arteco, sincera bonkoreco kaj spriteco rimarkindan chefverkon de nuntempa literaturo. La plej grandan famon ghuas liaj *Fabeloj al Helenjo*, kiuj estas jam multfoje reeldonitaj kaj estas plej shatata infana legajho.

Moskvo, Marto 1909.

N.Kabanov

Antaufabelo

Baju,[1] baju, baju!...

Unu okuleto de Helenjo dormas, alia rigardas; unu oreleto de Helenjo dormas, alia auskultas.

Dormu, Helenjo, dormu, belulino; kaj pachjo rakontos fabelojn. Kredeble, chiuuj estas tie chi: kato, kaj vilagha hundo, griza museto, kaj grileto sub la forno, makulkolora sturno en kagho, kaj malpacema koko.

Dormu, Helenjo, — tuj la fabelo komencighos. Jen la alta luno jam rigardas en la fenestron; jen straba leporo, kiu lame forkuras; jen lupaj okuloj, kiuuj eklumighas per flavaj fajretoj. Alflugas maljuna pasero al la fenestro, frapas per la beko sur vitron kaj demandas: "Chu baldau?" Chiuuj estas chi tie, chiuuj kolektighis; kaj chiuuj atendas la fabelon al Helenjo.

Unu okuleto de Helenjo dormas, alia rigardas, unu oreleto de Helenjo dormas, alia auskultas.

Baju, baju, baju!...

Fabelo pri la kuragha leporo Long-orela — Strab-okula — Mallong-vosta

Naskighis la leporeto en arbaro kaj chiam ghitis. Kiam ekkakis branĉo, kiam ekflugis birdo, kiam falis de l' arbo bulo da negho, — la spiro de la leporeto jam haltis pro timo.

Timis la leporeto dum unu tago, timis li dum du tagoj, timis dum semajno, timis dum jaro; fine li farighis granda, kaj subite tedis al li timi.

— Neniun mi timas! — li ekkriis tiel laute, ke oni audis lin en la tuta arbaro. - Nu jen, neniun mi timas!

Kolektighis maljunaj leporoj, alkuris malgrandaj leporidoj, kunvenis maljunaj leporinoj, — chiu aj auskultis, kiel fanfaronas la leporo Long-orela, Strab-okula, Mallong-vosta, — ili auskultis kaj ech al siaj propraj okuloj ne kredis. Ne okazis ankoraŭ, ke leporo neniun timas!

— Ho, vi, Strab-okula, chu vi ech lupon ne timas?

— Ne, lupon mi ne timas, nek vulpon, nek

urson, — neniun mi timas!

Tio chi estis ja tute amuza. Ekridegis la junaj leporidoj, kovrante siajn bushetojn per la antaŭaj piedoj! ekridis la bonaj maljunulinoj; ekridetis ech la maljunaj leporoj, kiuj jam falis en manegojn de vulpo kaj elprovis lupajn dentojn. Jen tre ridinda leporo! Ho kia ridinda! Kaj chiuj subite farighis gajaj, komencis rulighi, salti, kuradi, nu kvazau chiuj frenezighis.

— Pro kio tie chi longe paroladi! — kriis fine la kuraghighinta leporo. - Se mi renkontos lupon, mi mem formanghos lin...

Chiuj vidas, ke li estas ridinda kaj malsagha, kaj chiuj ridas. Krias la leporoj pri lupo, kaj jen... la lupo jam estas tie chi.

Li pashadis en arbaro por siaj lupaj aferoj, malsatighis kaj pensis: "Nu bone estus, mangheti leporon!" Subite li audas, ke tute proksime leporoj krias kaj pri la griza lupo parolas. Tuj li haltas, ekflaras aeron kaj komencas shtele alproksimighi.

Tute proksime alvenas la lupo al la gajighintaj leporoj, audas, ke ili mokas lin, kaj precipe — la fanfaroni leporo Long-orela — Strab-okula — Mallong-vosta.

— He, fratulo, atendu, tuj mi vin formanghos! — pensis la griza lupo kaj komencis rigardadi, kiu leporo fanfaronas pri sia kuragheco.

La leporoj nenion vidas kaj gajas ech pli multe ol antaue. Fine la fanfaron leporo sursaltis sur shtipeton, sidighis sur siaj postaj piedetoj kaj ekparolis:

— Auskultu vi, malkuraghuloj! Auskultu kaj rigardu min! Jen mi montros al vi artifikon... Mi... mi... mi...

Tie chi la lango de la fanfaronulo kvazau frostighis. La leporo ekvidis la lupon, kiu rigardas lin. Aliaj ne vidis la lupon, sed li mem vidis kaj ne kuraghis ech spiri.

Tiam okazis io tute eksterordinara.

La fanfaron leporo eksaltis supren, kvazau pilko, kaj pro timego falis rekte sur la larghan lupan frunton, rulis sur la lupa dorso, transturnighis ankoraŭ unu fojon en aero kaj poste tiel ekkuregis, ke shajne li estis preta elsalti el sia propra hauto.

Longan tempon kuris la malfelicha leporo, ghis kiam li perdis chiujn siajn fortojn.

Chiam shajnis al li, ke la lupo persekutas lin

kaj jen-jen ekkaptos lin per siaj dentoj.

Fine la malfelichulo entute senfortighis, fermis la okulojn kaj kiel malviva kushighis sub arbedo.

La lupo tiutempe kuris alian flankon. Kiam la leporo falis sur lin, shajnis al la lupo, ke iu ekpafis lin.

Kaj la lupo forkuris. Ja estas eble trovi en arbaro multajn aliajn leporojn, sed tiu chi estis ja freneza...

Longan tempon la aliaj leporoj ne povis rekonsciighi. Unu forkuris en arbitajhon, unu sin kashis post shtipeto, unu sin jhetis en kaveton.

Fine tedis al chiuj kashighi, kaj ili komencis iom post iom elrigardadi, kiuj estis pli kuraghaj.

— Nu lerte nia leporo timigis la lupon! — diris chiuj. - Sen li, ni ne estus foririntaj vivaj. Sed kie li estas, nia sentimema leporo?

Oni komencis lin serchi.

Iradis, iradis; nenie estas la kuragha leporo. Eble manghis lin alia lupo? Fine oni lin trovis: li kushas en kaveto sub arbitajho kaj estas apenau viva pro timo.

— Bravulo vi estas, Strabulo! — ekkriis chiuj leporoj unuvoche. - Nu jen, Strabulo! Lerte vi

timigis la maljunan lupon. Dankon al vi, fratulo!
Ja ni opiniis, ke vi fanfaronas.

La kuragha leporo tuj prenis dignan mienon;
eliris el sia kaveto, viglighis, fermetis okulojn kaj
ekparolis:

— Kiel vi opinias! He vi, malkuraghuloj!

De tiu chi tago la kuragha leporo komencis
mem kredi, ke li efektive neniun timas.

Fabelo pri kulineto

I.

Kiel naskighis la kulineto — neniu vidis.

Tio chi okazis sunan printempan tagon. La kulineto chirkaurigardis kaj diris:

— Bone!...

Ordigis la kulineto siajn flugilojn, frotis la maldikajn piedetojn unu je alia, ankoraŭ chirkaurigardis kaj diris:

— Kiel bone! Kia varma suno, kia blua chielo, kia verda herbeto — bone, bone! Kaj chio estas mia!...

Ankoraŭ interfrotis la kulineto siajn piedetojn kaj ekflugis; shi flugadas, chion admiras kaj ghojas. Kaj malsupre la herbeto verdas, kaj en la herbeto kashighas la purpura floreto.

— Kulineto, venu al mi! — ekkriis la floreto.

La kulineto malsuprenighis teren, surrampis sur la floreton kaj komencis trinki la dolchan floran sukon.

— Kia bona vi estas, floreto! — diras la kulineto, frotante sian bushon per la piedetoj.

— Nu jes, bona, sed ho ve, mi ne scias iradi, — plendis la floreto.

— Kaj tamen estas bone, — certigis la kulineto. - Kaj chio estas mia...

Ankorau shi ne finis paroli, kiam surflugis kun zumado vila burdo rekte al la floreto.

— Zzz... Kiu enrampis en mian floreton? Zzz... Kiu trinkas mian dolchan sukon? Zzz... Ha vi, malbona kulino, foriru! Zzz... foriru tuj, se vi ne volas, ke mi mordetu vin!

— Permesu, kion chi tio signifas? — ekpepis la kulineto. - Ja chio estas mia...

— Zzz... ne, mia!

La kulineto malfacile sin savis de la kolera burdo. Shi sidighis sur herbeto, lekis siajn piedetojn malpurigitajn de la flora suko, kaj ekkoleris.

— Kia malghentilulo estas chi tiu burdo... Ech mirige!... Ankoraŭ li volis piki... Tamen chio estas mia — suneto, kaj herbeto, kaj floretoj.

— Ne, ho pardonu — tio estas mia! — parolis vila vermeto, suprenrampanta laulonge sur shtipo de herbeto.

La kulineto konsideris, ke la vermeto ne scias flugi kaj ekparolis pli kuraghe:

— Pardonu min, vermeto, vi eraras... Mi ne malhelpas vin rampi, do vi ne disputu kun mi!

— Bone, bone... Sed vi nur ne tushu mian herbeton. Mi ne shatas chi tion, mi devas konfesi. Tro multaj el vi flugadas chi tie. Vi estas popolo malserioza, sed mi estas serioza vermeto... Mi diras malkashe: chio apartenas al mi. Jen mi surrampos sur herbeton kaj ghin formanghos; enrampos mi en kian ajn floreton mi volos kaj ankau formanghos ghin. Ghis revido!...

II.

Post kelkaj horoj la kulineto sciis chion, nome, ke krom suno, blua chielo kaj verda herbeto ekzistas ankoraŭ la koleraj burdoj, la seriozaj vermoj kaj la diversaj pikiloj sur la floroj. Unuvorte, shi eksentis grandan chagrenon. La kulineto ech ofendighis. Efektive, shi estis certighinta, ke chio apartenas al shi kaj estas kreita por shi, sed aliaj opinias tion saman. Ne, tio estas ne vera... ne povas esti!

Flugas la kulineto pluen kaj vidas... akvon.

— Nu, chi tio estas ankau mia! — gaje ekpepis shi. - Mia akvo... Ha, kiel estas gaje! Tie chi estas la herbeto, la floretoj.

Dume al la kulineto flugas renkonte aliaj kulinetoj.

— Bonan tagon, fratino!

— Bonan tagon, bonulinoj! Ja mi jam ekenuis flugadi sola. Kion vi faras chi tie?

— Ni ludas, fratino! Venu do al ni. Ĉe ni estas gaje... Ĉu vi antaŭ nelonge naskighis?

— Nur hodiaŭ... La burdo preskau pikis min, poste mi vidis vermon. Mi opiniis, ke ĉio estas mia, sed ili diras, ke ĉio estas ilia.

Aliaj kulinetoj trankviligis la gastinon kaj invitis ŝin ludi kune. Super la akvo la kulinoj ludis kolone: ili turnadas, flugadas, pepadas. Nia kulineto eĉ malfacile spiras pro ĝojo kaj hodiaŭ tute forgesas koleran burdon kaj seriozan vermon.

— Ha, kiel bone!... - murmuretas ŝi kun ravo. - Ĉio estas mia: kaj suneto, kaj herbeto, kaj akvo. Pro kio aliaj koleras, mi entute ne komprenas. Ĉio estas mia, sed mi neniun malhelpas vivi: ili ĉiuj flugadu, zumadu, gaju. Mi permesas...

Finis la kulineto ludi kaj gaji kaj sidighis por ripozi sur marcha kariko.[2] Necesas ja ripozi, efektive. La kulineto rigardas, kiel gajas ŝiaj fratinoj; subite alflugas pasero; de kie nur li ekaperis? Tiel ege li preterflugis, kvazaŭ jhetita ŝtono.

— Ha! Ho! — ekkriis la kulinetoj kaj disflugis chiuflanken.

Kiam la pasero forflugis, mankis tuta deko da kulinetoj.

— Ha, rabisto! — mallaŭdis la maljunaj kulinetoj. - Tutan dekon li mormanghis...

Chi tiu estis pli malbona, ol la burdo. La kulineto komencis timi kaj kashighis kun aliaj junaj amikinoj ankoraŭ pli profunde en la marcha herbo. Sed chi tie alia malbono; du kulinetojn formanghis la fiŝo, du aliajn — la rano.

— Kion do signifas tio? — miris la kulineto. - Chi tio estas vere tute nebona... Ja neeble estas vivi. Ha, kiaj malbonuloj!

Bone, ke estis multe da kulinetoj kaj neniu rimarkis la malpliighon. Nu, alflugis ankoraŭ novaj kulinetoj, kiuj ĵus naskighis. Ili flugadis kaj pepadis:

— Chio estas nia... Chio estas nia...

— Ne, ne chio estas nia, — ekkriis al ili nia kulineto. - Ekzistas ankoraŭ la koleraĵoj burdoj, la seriozaj vermoj, la malbonaj paseroj, la fiŝoj kaj la ranoj. Estu singardemaj, fratinoj!

Cetere, venis la nokto, kaj chiuj kulinetoj

kashighis en la kanoj, kie estas tiel varme. Disshutighis la steloj sur la chielo, suprenighis la luno, kaj chio rebrilis en akvo.

Ha, kiel estis bone!

— Mia luno, miaj steloj, — pensis nia kulineto, sed shi diris tion al neniu: oni ja povus ech tion chi forpreni...

III.

Tiel pasigis la kulineto la tutan someron. Multe shi gajis, sed ankau estis multe da malagrablajhoj. Dufoje preskau glutis shin la lerta hirundo; poste nerimarkeble alshtelighis la rano, — nu, ja multajn malamikojn havas la kulinetoj! Tamen, estis ankau ghojoj. La kulineto renkontis alian kuleton, kun viraj lipharetoj, kiu diris:

— Kiel bela vi estas, kulineto... Vivu kun mi...

Kaj ili ekvivis kune, tute bone ekvivis. Chiam kune: kien iris unu, tien iris la alia. Kaj ech ili ne rimarkis, kiel la somero pasas. Komencighis la pluvoj, la malagrablaj noktoj. Nia kulineto naskis ovetojn, kushigis ilin en densan herbon kaj diris:

— Ho, kiel mi estas laca!

Neniu vidis, kiel la kulineto mortis. Nu ja, shi ne mortis, sed nur ekdormis por la vintro; en

printempo ŝi revekighos kaj denove vivos.

Kiel vivis la lasta musho

I.

Kiel estis gaje somere... Ha, kiel estis gaje! Ech malfacile estas, rakonti chion lauorde... Kiom da mushoj estis — miloj; ili flugadis, zumis, gajis... Kiam naskighis la malgranda musheto, ghi ordigis siajn flugiletojn, — al ghi ankau farighis gaje. Tiel gaje, tiel gaje, ke ech neeble estas prirakonti. Plej interesa estis tio, ke de matene oni malfermadis chiujn fenestrojn kaj pordojn — en kiun fenestron vi volas flugi, en tiun flugu!

— Kia bona estajho estas homo! — rimarkis la malgranda musheto, flugante de fenestro al fenestro. - Ja por ni estas faritaj la fenestroj, kaj oni malfermas ilin ankau por ni. Tre bone, sed precipe, gaje...

Ghi milfoje elflugis en ghardenon, sidis tie sur verda herbeto, kun plezuro rigardis florantan siringon, delikatajn folietojn de tilio, disvolvinta siajn burghonojn, kaj florojn sur florbedoj. Ghardenisto, ghis nun nekonata de ghi, jam antaue prizorgis chion. Ha, kiel bona li estas, tiu chi ghardenisto! La musheto ankoraŭ ne estis naskighinta, kiam li jam chion preparis, chion,

kio estas necesa por la malgranda musheto. Ĉi tiu estis des pli miriga, ke li mem ne sciis flugi kaj iradis kun granda malfacileco, — li iom ŝancelighis kaj paroladis tute nekompreneble.

— Kaj de kie nur aperas ĉi tiuj malbenitaj mushoj? — murmuretis la bona ĝardenisto.

Kredeble, li, malfelichulo, parolis tion ĉi simple pro envio, ĉar li sciis nur surfosi bedojn, displanti florojn kaj survershi ilin per akvo, sed li ne povis flugi. La juna musheto intence ronde flugadis super la rugha nazo de la ĝardenisto kaj treege tedis lin.

Homoj ĝenerale estas tiel bonaj, kaj ĉie ili faras diversajn plezurojn precipe al mushoj. Ekzemple, Helenjo matene trinkis lakton, manghis panon kaj poste petis de onklino Olga sukeron, — tion ĉi ŝi faris nur por lasi al mushoj kelkajn gutojn da elvershita lakto kaj ĉefe — pecetojn da pano kaj sukero. Nu diru, kio povas esti pli bongusta ol tiuj ĉi pecetoj, precipe kiam oni flugadis tutan matenon kaj malsatighis?... Sed la kuiristino Paulinjo estis ankoraŭ pli bona ol Helenjo. Ŝi ĉiumatene iris intence por mushoj al magazeno kaj alportis de tie mirige bongustajn aĵojn: viandon, iafoje

fishon, kremon, buteron, — unuvorte, la plej bona virino en la tuta domo. Shi perfekte sciis, kio estas necesa por mushoj, kvankam shi ankau ne sciis flugi, kiel la ghardenisto. Tre bona virino, unuvorte!...

Kaj la onklino Olga? Ho, chi tiu virino, shajne, vivis speciale nur por mushoj... Shi per siaj propraj manoj malfermis chiumatene chiujn fenestrojn, por ke estu al mushoj pli oportune enflugi, kaj kiam pluvis au estis malvarme — shi fermis la fenestrojn, por ke mushoj ne malsekigu siajn piedetojn kaj ne malvarmumu. Poste la onklino Olga rimarkis, ke mushoj tre shatas sukeron kaj berojn, pro tio shi komencis chiutage kuiri berajn konfitajhojn. La mushoj certe tuj divenis, por kio chio estas farata, kaj pro dankemo rampis rekte en la pelveton kun bera konfitajho. Helenjo ankau tre volonte manghis konfitajhon, sed la onklino donadis al shi nur unu au du kulerojn da ghi, por ne senigi la mushojn. Char mushoj per unu fojo ne povas elmanghi chion, la onklino Olga konservis la restajhon de l' konfitajho en vitraj skatoloj (tial ke ghin ne elmanghu musoj, al kiuj konfitajho tute ne konvenas); kaj poste shi elmetis ghin chiutage

al la mushoj, kiam shi trinkis teon.

— Ha, kiel bonaj chiuuj estas! — ekkriis ravita la juna musheto,flugante de fenestro al fenestro. Eble, estas pli bone, ke homoj ne scias flugi. Tiam ili farighus mushoj, grandaj kaj manghema mushegoj, kaj certe mem formanghus chion... Ha, kiel bone estas, vivi en la mondo!

— Nu, homoj tute ne estas tiel bonaj, kiel vi opinias, — rimarkigis la majuna musho, kiu volonte murmuris. - Tio chi nur shajnas tiel... Chu vi rimarkis la homon, kiun chiuuj nomas "pachjo"?

— Ho jes. Chi tiu estas tre stranga sinjoro. Vi estas tre prava, bona maljuna musho... Por kio li fumas sian pipon, kiam li bonege scias, ke mi tute ne toleras la tabakan fumon? Shajnas al mi, ke li tion chi faras malbonintence kontrau mi... Kaj li nenion deziras fari por mushoj. Mi unu fojon provis la inkon, per kiu li chiam ion skribas, kaj mi preskau mortis... Tio chi, fine, povas indignigi. Mi vidis per miaj propraj okuloj, kiel en lia inkujo dronis du tre belaj, sed nespertaj mushetoj. Estis terura vidajho, kiam li eltiris per plumo unu el ili kaj faris sur sia papero grandan inkan makulon... Imagu vi, li kulpigis pri tio chi ne sin mem, sed nin! Kie do estas la justeco?

— Mi opinias, ke tiu chi «pachjo» entute malhavas justecon, kvankam li havas unu kvaliton, — respondis la maljuna sperta musho; — li trinkas post tagmangho bieron. Tio chi estas tute ne malbona kutimo! Mi devas konfesi, ke mi ankau shatas bieron, kvankam poste mi havas kapturnighon... Kion fari? Malbona kutimo!

— Mi ankau shatas bieron, — konfesis la juna musheto kaj ech iomete rughighis. - Al mi farighas poste tiel gaje, kvankam sekvantan tagon la kapo iomete doloras. Sed «pachjo» eble nenion faras por mushoj pro tio, ke li ne manghas konfitajhon, sed nur metas sukeron en glason da teo. Lau mia opinio, neeble estas, atendi ion bonan de homo, kiu ne manghas konfitajhon... Restas al li nur fumi sian pipon.

La mushoj entute bonege konis chiujn homojn, kvankam taksis ilin lau sia maniero.

II.

La somero estis varmega, kaj chiun tagon aperis chiam pli multaj mushoj. Ili faladis en lakton, en supon, en inkujon, zumadis, flugadis kaj tedis chiujn. Nia malgranda musheto jam farighis granda musho kaj kelkajn fojojn riskis

perei. Unuan fojon ghi enigis siajn piedetojn en konfitajhon, tiel ke ghi apenau sukcesis elighi, alian fojon pro duondormo ghi surflugis sur brulantan lampon kaj preskau ekbruligis siajn flugiletojn; trian fojon ghi preskau estis dispremita inter fenestraj kadroj, — unuvorte, okazintajhoj estis sufiche multaj.

— Kio estas tio? Vivo farighas neebila pro tiuj chi mushoj! — plendis la kuiristino; — Kvazau frenezaj ili chien enighadas... Necesas ilin ekstermi.

Ech nia musho komencis opinii, ke aperis tro multaj mushoj, precipe en kuirejo. Chiuvespere la plafono estis kovrita kvazau per viva movighanta reto, kaj kiam oni alportis provizajhon, mushoj sin jhetis sur ghin, kiel viva amaso, pushadis unuj la aliajn kaj treege intermalpacighis. La plej bonaj pecoj estis akirataj nur de la plej lertaj kaj fortaj, kaj al ceteraj restis nur manghrestajhoj. Paulinjo estis prava.

Sed poste okazis io terura. Iun fojon, matene, Paulinjo alportis kune kun provizajho tre bongustajn paperojn, t.e. ili farighis bongustaj, kiam oni dismetis ilin sur teleretoj, surshutis

pulvorigitan sukeron kaj survershis varman akvon.

— Jen bonega regalo por mushoj! — parolis la kuiristino Paulinjo, dismetante teleretojn sur la plej videblaj lokoj.

La mushoj mem divenis, ke tio chi estas farata por ili kaj gajamase surjhetis sin sur la novan manghajhon. Nia musho ankau rapidis al unu telereto, sed oni forpushis ghin maldelikate.

— Pro kio vi pushas, sinjoroj? — demandis ghi ofendita. - Cetere mi ja ne estas tiel avida, por forpreni ion de aliaj. Tio chi estas tro malghentila.

Poste okazis io stranga. La plej avidaj mushoj malsanighis unuaj... Ili komence iradis kiel ebriaj, poste ili tute faladis. Matene Paulinjo elbalais grandan teleron plenan da malvivaj mushoj. Restis vivaj nur la prudentaj, inter ili — ankau nia musho.

— Ni ne plu volas paperojn! — pepis chiu. - Ni ne plu volas!

Sed tamen la sekvantan tagon ripetighis la sama afero. El la prudentaj mushoj restis vivaj nur la plej prudentaj. Sed Paulinjo trovis, ke estas ech tro multe da tiaj plej prudentaj.

— Vivo estas neebbla pro ili... — plendis shi.

Tiam la sinjoro, kiun oni nomis pachjo, alportis tri vitrajn tre belajn kloshojn, envershis en ilin bieron kaj metis ilin sur telerojn. Tie chi kaptighis ech la plej prudentaj mushoj. Montrighis, ke chi tiuj kloshoj estis simple mushkaptiloj. Mushojn allogadis la bieraodoro, ili enighadis sub la kloshon kaj tie pereis, char ili ne sciis trovi elirejon.

— Jen nun bonege! — aprobis Paulinjo.

Shi montrighis entute senkora virino kaj gajighis pro la musha malfelicho.

Kio do en tio estas bonega? Nur pripensu! Se homoj havus samajn flugilojn, kiel havas mushoj, kaj se oni metus mushkaptilojn grandajn kiel domo, ili ankau enflugus tien. Nia musho, instruita per la maldolcha sperto ech de la plej prudentaj mushoj, entute chesis kredi al homoj. Ili nur shajnas bonaj, sed esence ne estas tiaj! Ili okupas sin dum sia tuta vivo nur per tio, ke ili trompas konfidemajn malfelichajn mushojn. Ho, homo estas la plej ruza kaj malbona besto, vere!

Mushoj tre malmultighis pro chiu malagrablajhoj, kaj poste okazis nova malfelicho. La somero pasis, komencighis pluvoj, ekblovis malvarma vento, kaj unuvorte farighis

malagrable vetero.

— Chu efektive pasis la somero? — miradis la restintaj vivaj mushoj. - Kiel do ghi jam sukcesis pasi? Tio estas nejusta.

Tio estis efektive pli fatala ol venenumitaj paperoj au vitraj mushkaptiloj. Oni povis serchi rifughejon kontraŭ la malbona vetero nur che sia plej granda malamiko, t.e. che sinjoro homo. Ho ve! nun la fenestroj jam ne estis malfermitaj tutan tagon, sed nur iufoje — la fenestretoj. Ech la suno mem lumas kvazau nur por trompi konfidemajn chambrajn mushojn. Kiel plachas al vi ekzemple tia afero? Matene la suno tiel gaje enrigardas en chiujn fenestrojn, kvazau ghi invitus chiujn mushojn en ghardenon. Oni povus opinii, ke revenis la somero... Kaj jen konfidemaj mushoj elfugas tra la fenestreto, sed la suno nur lumas, ne varmigas. Ili flugas reen, — la fenestreto estas fermita. Multe da mushoj pereis tiel dum malvarmaj autunaj noktoj, nur dank' al sia konfidemo.

— Ne, mi ne plu kredas, — parolis nia musho. - Nenion plu mi kredas... Se ech la suno trompas, al kiu oni povas konfidi?

Kompreneble kun alveno de l' autuno chiuj

mushoj havis la plej malbonan humoron. La karaktero malbonighis preskau che chiu. Antaŭaj ghojoj entute malestis. Chiu havis tiel malgajajn vizaghojn kaj farighis tiel malviglaj kaj malkontentaj! Iuj eĉ komencis mordi, kio antaŭe tute ne okazis.

La karaktero de nia musho tiel malbonighis, ke ghi tute ne rekonis sin mem. Antaŭe, ekzemple, ghi kompatis aliajn mushojn, kiam ili pereis, sed nun ghi pensis nur pri si mem. Ghi eĉ ne hontis diri laute, ke ghi pensis sekrete:

— Nu, ili pereu — por mi pli multe restos!

Unue, la varmaj anguloj, en kiuj bonkondata musho povas travivi la vintron, estas tute ne tiel multaj; due, estis tedaj aliaj mushoj, kiuj ĉie enighadis kaj ekkaptis el-sub la nazo plej bonajn pecojn kaj unuvorte kondukis sufiĉe sencere monie. Tempo estas nun por ripozi.

Tiuj ĉi aliaj mushoj kvazaŭ komprenis tiujn malbonajn pensojn kaj mortadis poente. Eĉ ne mortis ili, sed kvazaŭ ekdormis. Ĉiutage ili farighis ĉiam pli malmultaj, tiel ke jam superflujaj estis venenumitaj paperoj kaj vitraj mushkaptiloj. Sed por nia musho eĉ tio ĉi ne estis sufiĉa: ghi volis resti tute sola. Vi pensu

nur, kia agrablajho: kvin chambroj kaj nur unu sola musho!

III.

Alvenis fine tia felicha tago. Unufoje matene nia musho vekighis sufiche malfrue. Ghi de longe jam sentis ian nekompreneblan lacighon kaj preferis sidi senmove en sia anguleto sub forno. Sed nun ghi sentis, ke io neordinara okazis. Sufiche estis nur, alflugi al fenestro, kaj chio komprenighis per unu fojo. Falis unua negho... La tero estis kashita per hela blanka kovrajho.

— Ha, jen kio estas vintro! — rimarkis ghi. — Tio ja estas tute blanka, kvazau peco da bona sukero...

Poste la musho konstatis, ke chiu aj aliaj mushoj absolute malaperis. La malfelichuloj ne eltenis la unuan malvarmon, kaj ili ekdormis, kie ili okaze sin trovis. La musho en alia tempo kompatus ilin, sed nun ghi nur pensis:

— Nu jen estas bonege... Nun mi estas tute sola! Neniu manghos mian konfitajhon, mian sukeron, miajn pecetojn... Ha kiel bone!

Ghi chirkaufugis tra chiu aj chambroj kaj ankoraŭ unu fojon konvinkighis, ke ghi estas tute sola. Nun estas eble, fari chion, kion ghi volas. Kaj

kiel agrable, ke en la chambroj estas tiel varme! La vintro estas nur sur la strato, sed en la chambroj estas varme, gaje kaj komforte, precipe kiam vespere oni eklumigis lampojn kaj kandelojn. Per unu lampo cetere okazis malgranda malagrablaĵo. La musho surflugis rekte sur la flamon kaj preskau brulis.

— Tio chi estas kredeble vintra mushkaptilo, — konsideris ghi, vishante la ekbruligitajn piedetojn... — Ne, vi min ne trompos... Ho mi bonege komprenas chion! Vi volas bruligi la lastan mushon? Sed mi tute ne volas... Ankau jen kuireja forno — chu efektive mi ne komprenas, ke tio chi estas ankau mushkaptilo?

Nur kelkajn tagojn estis felicha la lasta musho, sed poste subite ghi enuis, tiel enuis, tiel enuis, ke shajnas ech neeble prirakonti. Certe al ghi estis varme, ghi estis sata, sed poste — poste ghi ekenuis. Flugadas ghi, flugadas, ripozas, manghas kaj denove flugadas — sed ho ve, ghi rekomencas enui poste ankoraŭ pli ol antaue.

— Ha, kiel mi enuas! — pepis ghi per la plej kompatinda, delikata vocho, flugante de chambro al chambro. - Se nur restus ankoraŭ unu

musheto, ech la plej malbona, sed tamen unu musheto...

Kiel ege suferis la kompatinda lasta musho pri sia soleco — neniu volis kompreni. Certe, chi tio kolerigis ghin ankoraŭ pli, kaj ghi sin altrudadis al homoj kvazau freneza. Al unu ghi sidighis sur la nazo, al alia — sur la orelo; alifoje ghi komencis flugi antaŭ la okuloj. Unuvorte — ghi agis vere freneze.

— Nu kiel vi ne volas kompreni, ke mi estas tute sola kaj ke mi tre enuas? — pepis ghi al chiu. - Vi ech ne povas flugi, pro tio vi ja ne scias, kio estas la enuo. Se nur iu bonvolus ludi kun mi... Sed ne, por kio vi taugas? Kio povas esti pli mallerta kaj malgracia ol homo? La plej malbela kreitaĵo, kiun mi iam renkontis...

La lasta musho tedis la hundon, la katon — fine chiujn. Krome ghi ofendighis, kiam la onklino Olga diris:

— Ha, lasta musho... Mi petas, ke oni ne tushu ghin. Ghi vivu la tutan vintron.

— Kio estas chi tio? Jen estas vera ofendo. Shajne, shi ech opinias, ke shi faris komplezon al mi dirante "Ghi vivu". Sed se mi enuas! Se mi eble ech tute ne volas vivi? Nu jen, mi ne volas, ne

volas...

La lasta musho tiel koleris kontraŭ chiuj, ke eĉ al ĝi mem farighis terure. Ĝi flugadis, zumis, pepis...

Araneo, sidanta en angulo, fine kompatis ĝin kaj diris:

— Kara musho, venu al mi... Kia bela estas mia araneajho!

— Mi tre dankas... Jen ankoraŭ aperis amiko! Nu, mi scias, kio estas via bela araneajho! Certe vi iam estis homo, kaj nun vi nur ŝajnigas vin araneo.

— Kiel vi volas, mi ja deziras bonon al vi.

— Ha, kia abomeno! Tio ĉi nomighas deziri bonon: formanghi la lastan mushon!

Ili tre malpacighis, kaj tamen la musho enuis, tiel enuis, ke eĉ neeble estas prirakonti. Ĝi koleris kontraŭ chiuj, lacighis kaj laute diris:

— Se tiel estas, se vi ne volas kompreni, ke mi enuas, mi restos sidanta en angulo la tutan vintron... Jen! Jes, mi sidos kaj por nenio eliros...

Ĝi eĉ ploretis pro malĝojo, rememorante la pasintan someran ĝojon. Kiom da ĝajaj mushoj estis; kaj ĝi deziris resti tute sola... Tio ĉi estis fatala eraro.

La vintro dauris senfine, kaj la lasta musho komencis pensi, ke la somero tute ne revenos. Ghi volis morti kaj ploradis mallaute. Certe, homoj elpensis vintron, ĉar ili elpensas entute ĉion, kio estas malutila al mushoj. Sed eble la onklino Olga kashis ien la someron, kiel ŝi kashas sukeron kaj konfitajhon.

La lasta musho estis tute preta, morti pro malespero, kiam okazis io eksterordinara. Ghi kiel kutime estis sidanta en sia anguleto kaj koleris, kiam subite ghi audis — zzzz... Komence ghi ne kredis al siaj propraj oreloj kaj pensis, ke io ghin trompas. Sed poste... Ho Dio, kio estis tio! Preter ghi flugis vera viva musheto, ankoraŭ tute juna. Ghi ĵus naskighis kaj ghojis.

— La printempo komencighas... la printempo! — ghi zumis.

Kiel ili ekghojis unu pri alia! Ili ĉirkauprenadis sin reciproke, interkisis kaj eĉ ĉirkaulekis unu la alian per la rostroj. La maljuna musho dum kelkaj tagoj rakontadis, kiel malbone ghi pasigis la tutan vintron, kiel ghi enuadis sola. La juna musheto nur ridis per delikata voĉo kaj neniel povis kompreni, kio estas enui.

— Printempo, printempo! — ripetadis ghi.

Kiam la onklino Olga igis forpreni chiujn fenestrajn kadrojn de l' vintro kaj Helenjo rigardis el la unua malfermita fenestro, la lasta musho shajne komprenis chion..

— Nun mi scias chion, — zumis ghi, elflugante tra la fenestro: — Ni, mushoj, faras la someron.

Lakteto, avena kacheto kaj griza kato Murko

I.

Kiel vi volas, sed tio chi estas miriga! Kaj plej mirige estas, ke tio chi ripetighas chiutage. Jes, kiam estas metitaj sur la fornnon en kuirejo la potoj kun lakteto kaj la argila kaserolo kun avena kacheto, tiam la afero komencighas. Unue ili staras kvazau trankvile, sed poste komencighas interparolado.

— Mi estas lakteto...

— Mi estas avena kacheto...

Komence la interparolado iras tute mallaute, murmurete; sed poste kacheto kaj lakteto komencas laugrade varmighi pro kolero.

— Mi estas lakteto!

— Mi estas avena kacheto!

La kacheton oni surkovras per argila kovrilo, kaj ghi murmuras en sia kaserolo kiel maljunulo. Sed kiam ghi komencas koleri, suprenlevighas en ghi veziko, krevas kaj diras:

— Tamen mi estas avena kacheto... pum!

Al la lakteto tiu chi fanfaronado shajnis treege

ofenda. Diru, mi petas, kia vidindajho — ia avena kacho! La lakto komencis varmegighi, shaumo suprenlevighis kaj penadis elighi el sia poteto. Momenton la kuiristino malatentis, jen la lakteto elvershighis sur la varmega forno.

— Nu jam tiu chi malbenita lakteto! — plendis chiufoje la kuiristino. - Se iomete oni malatentas, ghi tuj elighas.

— Kion mi povas fari, se mi havas tian ekflameman karakteron? — diris la lakteto por sia pravigo. - Mi mem ja ne estas ghoja, kiam mi ekflamighas. Sed tie chi ankoraŭ la kacheto chiam fanfaronas: "mi estas kacheto, mi... kacheto, mi... kacheto"... Sidas ghi en la kaserolo, murmuras, nu jen mi ekflamighas.

La afero kelkfoje iradis ghis tio, ke la kacheto elkuris el la kaserolo, malgrau ghia kovrilo, — rampis sur la platformon, chiam ripetante:

— Mi estas kacheto! kacheto! kacheto!... ch-ch-ch-ch-ch!

Vere, tio chi ne okazis ofte, sed tamen okazis, kaj la kuiristino repetis malespere chiufoje:

— Nu jam chi tiu malbenita kacheto! Pro kio do ghi ne sidas trankvile en kaserolo? Estas vere mirige!

II.

La kuiristino ghenerale sufiche ofte koleris, kaj estis ja ne malmulte da kauzoj por tia kolero. Ekzemple la kato Murko! Jes, li estis tre bela kato, kaj la kuiristino tre amis lin. Chiun matenon Murko proksime sekvis la kuiristinon kaj miauis per tia plenda vocho, ke shajne ech shtona koro devus kompati.

—Kia nesatigebla ventregio! — miris la kuiristino, forpelante la katon. - Kiom da hepato vi jam manghis hierau?

—Tio chi estis ja hierau! — miris siavice Murko. - Sed hodiau mi denove volas manghi. Miau!

—Vi kaptu musojn kaj manghu ilin, maldiligentulo!

—Facile estas, diri tion, sed provu vi mem ekkapti nur unu muson, — respondis Murko. - Cetere shajnas, ke mi jam sufiche penas. Ekzemple, kiu lastan semajnon kaptis musidon? Kaj pro kio mi havis graton laulonge de la tuta nazo? Raton mi preskau kaptis, sed ghi mem tiel alkrochighis al mia nazo... Tre facile estas, nur paroli: kaptu musojn!

Manghinte hepaton, Murko sidighis apud la

forno, kie estas pli varme, fermis la okulojn kaj dolche dormetadis.

— Jen, kiom li nutris sin, — rimarkis la kuiristino. - Ech okulojn li fermas, maldiligentulo... kaj li volas, ke chiam oni donu al li viandon!

— Mi do ne estas monahho por ne manghi viandon, — sin pravigis Murko, malfermante nur unu okulon. - Krome mi ankau shatas mangheti fishojn. Mi ghis nun ne povas diri, kio estas pli bongusta: hepato au fisho. Pro ghentileco mi manghas unu kaj alian... Se mi estus homo, mi nepre estus au fishkaptisto au kolportisto, kiu alportas al mi hepaton. Mi nutrus ghis plena satigho chiujn katojn en la mondo kaj mi mem ankau estus chiam sata...

Post mangho Murko volonte sin okupas diversmaniere por amuzigho. Ekzemple, li sidas dum du horoj sur la fenestro, kie pendas kagho kun sturno. Estas tre agrable rigardi, kiel saltas la malsagha birdo.

— Mi konas vin, maljuna friponulo! — krias la sturno. - Nu pro kio vi rigardas min?

— Sed se mi deziras konatighi kun vi?

— Mi scias, kiel vi konatighas. Kiu antau

nelonge manghis vivan paseron? Vi, abomenulo!

— Neniĉ mi estas abomenulo, kaj eĉ male. Ĉiuj min amas. Venu al mi, mi fabeleton rakontos al vi.

— Ha friponulo... bona fabelisto! Mi vidis, kiel vi rakontis fabeletojn al rostita kokido, kiun vi shtelis en la kuirejo... Bone!

— Kiel vi volas, mi ja parolas nur por via plezuro. La rostitan kokidon mi efektive manghis, sed estis ja tute egale, ĝi jam taugis por nenio.

III.

Interalie Murko ĉiumatene sidighis ĉe la hejtighanta kuireja forno kaj paciencas auskultis, kiel malpacas la lakteto kaj la kacheto. Li neniĉ volis kompreni, en kio kushas la kauzo kaj nur palpebrumis.

— Mi estas lakteto.

— Mi estas kacheto! Kacheto — kacheto — ch-ch-ch...

— Ne, mi ne komprenas, tute ne komprenas, parolis Murko. - Pro kio vi malpacas? Ekzemple, se mi ripetos: Mi estas kato, mi estas kato, kato, kato... Ĉu estos ofenda por iu? Ne, mi ne komprenas... Cetere mi devas konfesi, ke mi preferas lakteton, precipe kiam ĝi ne koleras.

Unu fojon la lakteto kaj la kacheto pli ol kutime varmege malpaciĝis; ili tiel malpaciĝis, ke duone ili elighis sur la forno, de kio rezultis fortega haladzo. Alkuris la kuiristino kaj ekghemis.

— Nu kion mi faros nun? — plendis ŝi, demetante de la forno la lakteton kaj la kacheton. - Neeble estas eĉ, momenton foriri.

Forpreninte lakteton kaj kacheton, la kuiristino foriris en magazenon por aĉeti provizajhojn. Murko tuj ekuzis tiun okazon. Li sidighis ĉe la lakteto, blovis ĝin kaj parolis:

— Mi petas, ne koleru, lakteto...

La lakteto videble komencis trankvilighi. Murko ĉirkauris ĝin, ankoraŭ unu fojon blovis ĝin, ordigis siajn lipharojn kaj diris afable:

— Aŭskultu, sinjoroj!... Malpaci ĝenerale ne estas bone. Jes. Elektu min kiel juĝiston: mi tuj prijuĝos vian aferon.

La nigra blato, sidanta en fendo, eĉ ektusetis pro rido. Nu jen la juĝisto. Ha, ha! Nu, maljuna friponulo, jen kion vi elpensis. Sed la lakteto kaj la kacheto estis ĝojaj, ke ilia malpaco estos fine juĝita. Ili mem ne sciis rakonti, el kio konsistas la malkonsento, kaj pro kio ili malpacas.

— Bone, bone, mi chion esploros, — diris la kato Murko. - Mi ne trompos vin... Nu, komencu ni kun la lakteto.

Li chirkauiris kelkajn fojojn la poteton, provis ghin per la piedeto, blovis sur la lakton kaj komencis trinki.

— Ho ve! Helpo, helpo! — ekkriis la blato. - Li la tutan lakton eltrinkos, kaj oni opinios, ke mi tion faris.

Kiam revenis de la magazeno la kuiristino kaj ekrigardis la poteton — jen ghi estas malplena. La kato Murko dormis apud la forno en dolcha dormo, kvazau nenio okazis.

— Ha vi, sentaugulo! — mallaudis la kuiristino, ekkaptante lin che la orelo. - Kiu trinkis la lakton? Diru!

Kiel ajn dolore estis, Murko shajnigis, ke li nenion komprenas kaj ne scias paroli. Kiam oni eljhetis lin ekster la pordon, li skuis sin, lekis la malordigitan hararon, ordigis la voston kaj parolis:

— Se mi estus kuiristo, chiu de mateno ghis nokto nur trinkus lakton. Cetere, mi ne koleras kontrau mia kuiristino, char shi ne komprenas chi tion...

Estas tempo por dormi

I.

Ekdormas alia okuleto de Helenjo, ekdormas alia oreto de Helenjo...

— Pachjo, chu vi estas tie chi?

— Tie chi mi estas, infaneto...

— Chu vi scias, pachjo? Mi volas esti reghino...

Ekdormas Helenjo kaj ridetas en songho.

Ha, kiel multaj floroj! Kaj chiuĵ ili ankau ridetas. Chirkaustaras ili ronde apud Helenja liteto, intermurmuretas kaj ridas per delikataj mallautaj voĉoj. Purpuraj floretoj, bluaj floretoj, flavaj floretoj, chielbluaj, rozaj, rughaj, blankaj, — kvazau chielarko falis teren kaj disshutighis en vivaj fajreroj, diverskoloraj fajretoj kaj gajaj infanaj okuletoj.

— Helenjo volas esti reghino! — gaje sonis kampaj kampanoloj, balancighante sur graciaj verdaj trunketoj.

— Ha, kia ridinda shi estas! — murmuretis modestaj miozotoj.

— Sinjoroj, necesas serioze prikonsideri chi tiun aferon, — atakeme entrudighis flava leontodo. - Mi almenau tute ne atendis tion...

— Kion signifas — esti reghino? — demandis blua kampa cejano. - Mi elkreskis en kampo kaj ne komprenas viajn urbajn morojn.

— Tre simple... — enmiksighis roza kariofilo. - Tio chi estas tiel simpla, ke ech ne necesas klarigi. Reghino — tio chi estas... tio chi... Chu vi do ne komprenas? Ha, kiaj strangaj vi estas... Reghino, tio chi estas, kiam floro estas rozkolora, kiel mi. Alivorte: Helenjo volas esti kariofilo. Chu tio ne estas komprenebla?

Chiuuj gaje ekridis. Silentis nur rozoj. Ili opiniis sin ofenditaj. Kiu ne scias, ke reghino de chiuj floroj estas rozo, delikata, bonodora, miriga? Kaj subite kariofilo sin nomas reghino... Kia malbonajho! Fine unu rozo koleris, farighis tute purpura kaj ekparolis.

— Ne, pardonu, Helenjo volas esti rozo... jes! Rozo estas reghino pro tio, ke chiuj ghin amas.

— Jen, bone! — diris kolere leontodo. - Kion vi opinias pri mi?

— Leontodo, ne koleru, ni petas! — admonis la arbaraj kampanoloj. - Tio malbonigas la karakteron kaj krome, tio estus nebela. Vidu, ni silentas pri tio, ke Helenjo volas esti arbara kampanolo, char tio estas klara per si mem.

II.

Estis multe da floroj, kaj ili tiel ridinde disputadis; la kampaj floretoj estis tute modestaj — konvaloj, violoj, miozotoj, kampanoloj, cejanoj, kampa kariofilo; sed la floroj kreskintaj en orangherioj iomete fanfaronis — rozoj, tulipoj, lilioj, narcisoj, levkojoj, kvazau richaj infanoj feste vestitaj. Helenjo pli amis modestajn kampajn floretojn, el kiuj ŝi faradis bukedojn kaj plektadis florkronojn. Kiel ili chiuj estas bonaj!

— Helenjo tre amas nin, — murmuretis la violoj. - Ja ni aperas printempe unuaj. Apenau negho fluidighis, ni jam estas chi tie.

— Kaj ni ankau, — diris la konvaloj. - Ni estas ankau printempaj floretoj... Ni ne estas kapricaj kaj kreskas simple en arbaro.

— Sed chu ni estas kulpaj, se estas tro malvarme al ni por kreski simple en kampo? — plendis bonodoraj krispaj levkojoj kaj hiacintoj. - Ni estas tie chi nur gastoj, kaj nia patrujo estas malproksima, kie estas varme kaj neniam estas vintro. Ha, kiel agrable estas tie, kaj ni chiam sopiras pri nia kara patrujo... Che vi norde estas tiel malvarme. Nin Helenjo ankau amas, kaj ech

tre...

— Che ni estas ankau agrable, — disputis la kampaj floroj. - Certe, okazas iufoje granda malvarmo, sed tio estas utila... Kaj krome malvarmo mortigas niajn plej grandajn malamikojn, kiel vermojn, kulojn. Se ne ekzistus malvarmo, estus tre malbone al ni.

— Ni ankau shatas malvarmon, — aldiris la rozoj.

Tion saman diris azaleoj kaj kamelioj. Chiuĵ ili amas malvarmon, kiam ili preparas florajn burghonojn.

— Jen kio, sinjoroj, ni chiuj rakontu ion pri niaj patrujoj, — proponis la blanka narciso. - Tio chi estas tre interesa... Helenjo nin auskultos. Ja, ŝi amas nin...

Nun ekparolis chiuj per unu fojo. La rozoj rememoris kun larmoj la benitajn valojn de Shirazo, la hiacintoj parolis pri Palestino, azaleoj pri Ameriko, lilioj pri Egipto. La floroj kolektighis chi tien el chiuj terpartoj de l' mondo. Plej multaj floroj alvenis de sudo, kie estas tiom da suno kaj malestas vintro. Kiel bone estas tie! Jes, eterna somero! Kiaj grandegaj arboj kreskas tie, kiaj mirigaj birdoj, kiom da belulinoj-papilioj, similaj

al flugantaj floroj, kaj kiom da floroj, similaj al papilioj!

— Norde ni estas nur gastoj, norde estas malvarme al ni, — murmuretis chiuj sudaj floroj.

La enlandaj kampaj floretoj ech kompatis ilin. Efektive necesas havi grandan paciencon, kiam blovas malvarma norda vento, falas malvarma pluvo kaj negho. Certe printempa negheto rapide degelas, sed tamen ghi estas negho.

— Vi havas grandegan mankon, — klarigis cejano, auskultinte tiujn chi rakontojn. - Mi ne disputas, vi eble estas iufoje pli belaj ol ni, kampaj floretoj, mi volonte konsentas pri tio... jes. Unuvorte, vi estas niaj karaj gastoj, sed via chefa manko estas tio, ke vi kreskas nur por richuloj; ni kontraue kreskas por chiuj. Ni estas multe pli bonaj... Jen mi, ekzemple: vi vidas min en manoj de chiu vilaghana infano. Kiom da ghojo mi donas al chiuj malrichaj infanoj! Ne necesas pagi monon por mi, sed sufichas nur eliri en kampon. Mi kreskas kune kun sekalo, tritiko, aveno...

III.

Helenjo auskultis chion, pri kio rakontadis al shi la floretoj, kaj miris. Shi treege deziris mem

vidi tiujn malproksimajn landojn, pri kiuj oni ĵus parolis.

— Se mi estus hirundo, mi tuj ekflugus, diris ŝi fine. Pro kio mi ne havas flugiletojn? Ha kiel charme estus, farighi birdeto!

Ŝi ankoraŭ ne finis paroli, kiam alrampis al ŝi kokcinelo, vera kokcineleto, rugheta, kun nigraj makuletoj, kun nigra kapeto, kun tiaj maldikaj nigraj lipharetoj kaj nigraj maldikaj piedetoj.

— Helenjo, ni flugu! — murmuris la kokcinelo, movetante la lipharetojn.

— Mi ne havas flugilojn, kokcineleto!

— Sidighu sur mi...

— Kiel mi sidighos, kiam vi estas tiel malgranda?

— Nun jen, rigardu...

Helenjo komencis rigardi kaj miris ĉiam pli. La kokcineleto ordigis la suprajn malmolajn flugilojn kaj samtempe ghi pligrandighis duoble; poste ghi ordigis la delikatajn kiel araneajho malsuprajn flugiletojn kaj farighis ankoraŭ pli granda. Ghi kreskis, kreskis, ghis fine ghi estis tiel granda, tiel grandega, ke Helenjo povis libere sidighi sur ghia dorso, inter la rughaj flugiletoj.

Estis tre oportune.

— Chu vi sentas vin bone, Helenjo? —
demandis la kokcineleto.

— Tre bone.

— Nu, tenu vin nun pli forte...

En unua momento, kiam ili ekflugis, Helenjo
ech fermis la okulojn pro timo. Ekshajnis al shi,
ke flugas ne shi, sed chio sub shi — urboj,
arbaroj, riveroj, montoj. Poste shajnis al shi, ke
shi farighas tiel malgranda-malgrandeta, kiel
pingla kapeto, kaj che tio tiel malmultepeza kiel
lanuga semero de leontodo. La kokcineleto flugis
rapide-rapide, tiel ke vento vere fajfis inter ghiaj
flugiloj.

— Rigardu, kio estas tie malsupre... — diris al
shi la kokcineleto.

Helenjo rigardis malsupren kaj ekmiregis.

— Ha, kiom da rozoj — rughaj, flavaj, blankaj,
rozaj!...

La tero estis kvazau kovrita per viva tapisho
de rozoj.

— Malsuprenighu ni teren, kokcineleto! —
petis shi.

Ili malsuprenighis, kaj Helenjo farighis
denove granda, kiel shi estis antaue; kaj la

kokcineleto farighis malgranda.

Helenjo longe kuradis sur la roza kampo kaj kolektis grandan bukedon da floroj. Kiel belaj ili estis — tiuj chi rozoj: kaj ech la kapo turnighas pro iliaodoro. Se oni povus transporti tiun chi rozan kampon al ni, norden, kie rozoj estas nur karaj gastoj!

— Nu, nun ni flugu pluen, — diris la kokcinelo, ordigante siajn flugilojn.

Ghi denove farighis granda-grandega, kaj Helenjo — malgranda, tute malgranda.

IV.

Ili ekflugis pluen.

Kiel estis bele chirkaue! La chielo estis tiel blua kaj malsupre ankoraŭ pli blua estis la maro. Ili flugis super kruta kaj shtonega bordo.

— Chu efektive ni flugos trans la maron? — demandis Helenjo.

— Jes... Nur sidu trankvile kaj tenu vin pli forte.

Komence Helenjo timis, poste — ne. Krom chielo kaj akvo nenio restis. Sur la maro naghis shipoj kiel grandaj birdoj kun blankaj flugiloj... Malgrandaj shipoj estis similaj al mushoj. Ha, kiel bele, kiel bone! Kaj malproksime jam vidighis

la mara bordo, malalta, flava kaj sabla, — marenfluejo de iu grandega rivero, unu tute blanka urbo, kvazau ghi estus konstruita el sukero. Kaj poste vidighis malviva dezerto, kie staris solaj piramidoj. La kokcineleto malsuprenighis sur la bordon de la rivero. Tie chi kreskis verdaj papirusoj kaj lilioj — mirigaj, delikataj lilioj.

— Kiel bone estas che vi, tie chi, — ekparolis Helenjo kun ili. - Chu vintro ne ekzistas che vi?

— Sed kio estas vintro? — miris lilioj.

— Vintro — ghi estas, kiam negho falas...

— Sed kio estas negho?

La lilioj ech ekridis. Ili opiniis, ke la malgranda norda knabineto shercas. Vere, de nordo chiu-autune alflugas chi tien grandegaj amasoj da birdoj, kiuj ankau rakontas pri vintro; sed ili mem ne vidis ghin kaj rakontas pri tio, kion ili nur audis. Helenjo ankau ne kredis, ke vintro povas ne esti kaj sekve pelteto kaj varmaj shuoj povas esti ne necesaj.

Ili ekflugis pluen. Sed Helenjo jam ne miris pri la blua maro, nek pri la montoj, nek pri la bruligita de suno dezerto, kie kreskas hiacintoj.

— Al mi estas varmege, — ghi plendis. - Nu,

kokcineleto, estas vere ne bone, kiam dauras eterne somero.

— Ne al tiu, kiu kutimis, Helenjo.

Ili flugis al altaj montoj, sur kies suproj kushas eterna negho. Chi tie ne estas tiel varme. Post montoj komencighis netraireblaj arbaroj. Sub arkajho de arboj estis mallume, char la suna lumo ne penetras tra la densaj suprajhoj de l' arboj. Sur branĥoj saltis simioj. Kaj kiom estis da birdoj — verdaj, rughaj, flavaj, bluaj... Sed plej mirigaj estis floroj kreskantaj rekte sur arbaraj trunkoj. Estis floroj kun tute fajra koloro, floroj similaj al tute malgrandaj birdetoj kaj al grandaj papilioj, — la tuta arbaro kvazau brulis per diverskoloraj vivaj fajretoj.

— Tio chi estas orkideoj, — klarigis la kokcineleto.

Iradi estis neeble chi tie, chio interplektighis.

Ili ekflugis pluen. Jen grandega rivero inter verdaj bordoj. La kokcineleto malsuprenighis rekte sur grandan blankan floron, kreskantan sur akvo. Tiajn grandajn florojn Helenjo ankoraŭ ne vidis.

— Tio chi estas la sankta floro, — klarigis la kokcineleto. - Ghi nomighas Lotoso...

V.

Helenjo vidis tiel multon, ke fine shi lacighis. Shi volis reveni hejmen: chiuokaze hejme estas pli agrable.

— Mi amas negheton, — diris Helenjo. - Sen vintro estas nebone...

Ili denove ekflugis, kaj ju pli alten ili suprenighis, des pli malvarme farighadis. Baldaŭ malsupre ekvidighis neghaj kampoj. Verdis nur sola abia arbaro. Helenjo treege ghojis, kiam shi ekvidis la unuan abieton.

— Abieto, abieto! — shi ekkriis.

— Bonan tagon, Helenjo! — ekkriis la verda abieto al shi de malsupre.

Tiu chi estis vera Kristnaska abieto. Helenjo tuj ekkonis ghin. Ha, kia charma abieto! Helenjo sin klinis, por diri al ghi, kiel rava ghi estas, sed subite shi ekfalis malsupren. Ho, kiel terure! Shi turnighis kelkajn fojojn en aero kaj falis rekte en molan neghon. Pro timo Helenjo fermis la okulojn kaj ne sciis, chu shi estas viva au malviva.

— Kiel vi alvenis chi tien, etulino! — iu demandis shin.

Helenjo malfermis la okuletojn kaj ekvidis grizan-grizan ghiban maljunulon. Shi ankau

rekonis lin tuj. Li estis tiu sama maljunulo, kiu alportas al saghaj infanoj Kristnaskajn abietojn, orajn stelojn, skatoletojn kun bombonoj kaj plej mirigajn ludilojn. Ho, li estas tiel bona, tiu maljunulo! Li tuj prenis shin sur siajn manojn, kovris shin per sia peltó kaj denove demandis:

— Kiel vi alvenis ĉi tien, malgranda knabineto?

— Mi vojaĝhis sur la kokcineleto... Ho, kiom mi vidis, aveto!

— Nu, nu!

— Mi konas vin, aveto! Vi alportas al infanoj abiojn...

— Nu, nu... Kaj nun mi ankau aranghas abion.

Li montris al ŝi longan stangon, kiu tute ne estis simila al abio.

— Chu tio estas abio, aveto? Tio estas ja simpla granda bastonego.

— Nu, jen vi vidos...

La maljunulo portis Helenjon en proksiman vilagheton, tute kovritan de negho. Elstaris el sub la negho nur tegmentoj kaj kamentuboj. La maljunulon jam atendis vilaghaj infanoj. Ili saltis kaj kriis:

— Abio, abio!

Ili alvenis al la unua dometo. La maljunulo prenis nedrashitan garbon de aveno, alligis ghin al fino de la stango kaj starigis la stangon sur tegmenton. Tuj kunflugis de chiuĵ flankoj malgrandaj birdetoj, kiuj neniam forflugas dum vintro: paseretoj, hortulanoj, kaj ili bekpikis la grajnoj.

— Tio ĉi estas nia abio! — kriis ili.

Al Helenjo subite farighis tre gaje. Shi unuan fojon vidis, kiel oni aranghas vintre abion por birdoj. Ha, kia bona maljunulo! Unu pasereto, kiu plej multe klopodis, per unu fojo rekonis Helenjon kaj ekkriis:

— Nu, ĵen estas Helenjo! Mi tre bone konas shin. Shi ne nur unu fojon nutris min per panpecetoj... Jes.

Kaj aliaj paseretoj ankau rekonis shin kaj laute ekpepis pro ghoyo.

Alflugis ankoraŭ unu pasero, kiu montrighis granda malpacemulo. Li komencis dispushadi chiuĵn kaj ekkaptadi la plej bonajn grajnoj.

Helenjo ekkonis lin.

— Bonan tagon, pasereto!

— Ha, ĵen estas vi, Helenjo? Bonan tagon!

La malpacema pasero eksaltis sur unu

piedeto, malice faris signon per unu okulo kaj diris al la bona kristnaska maljunulo:

— Helenjo volas esti reghino... Jes, mi mem antaŭ nelonge audis, kiam ŝi tion diris.

— Chu vi volas esti reghino, etulino? — demandis la maljunulo.

— Mi tre volus, aveto!

— Bonege. Nenio estas pli simpla: chiu reghino estas virino kaj chiu virino estas reghino... nun iru hejmen kaj diru tion al chiuj aliaj infanetoj.

La kokcinelo estis ghoja, forighi de tiu loko, antaŭ ol iu malmoda pasero manghos ghin. Ili ekflugis hejmen — rapide... Kaj tie jam chiuj floretoj atendas Helenjon. Ili la tutan tempon diskutadis pri tio, kio estas reghino.

Baju, baju, baju...

Unu okuleto de Helenjo dormas, alia rigardas, unu oreto de Helenjo dormas, alia auskultas. Chiuj nun kolektighis apud Helenja liteto: la kuragha leporo, kaj la pasero, la lasta musho kaj la malgranda kulineto, ech la lakteto, la kacheto kaj kato Murko. Chiuj estas chi tie, chiu estas apud Helenjo.

— Pachjo, mi amas chiujn... — murmuretas

Helenjo. - Mi amas, pachjo, ech nigrajn blatojn...

Fermighis alia okuleto, ekdormis alia oreleto. Kaj apud Helenja liteto verdas gaje la printempa herbo, ridas la floretoj, multaj floretoj: chielbluaj, rozaj, flavaj, blankaj, rughaj. Verda betulo klinighis super la liteto mem kaj murmuris ion dolche, dolche. Kaj la suno lumas, kaj la sablo flave brilas, kaj la blua mara ondo vokas al si Helenjon.

Dormu, Helenjo, dormu, belulino!

Baju, baju, baju...

Notoj

Rusa interjekcio; rekantajho por dormigi infanojn.

[^^^]

Lat. carex

[^^^]